



MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 6

JUNIO 2026 Kol. 490/42

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

Enhavo: Proverboj, Aŭstrio agnoskas Esperanton, Pragaj pontoj, Kvarpiedaj entombigistoj de nuklea katastrofo, La bufo, Ŝercoj

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

Popolaj proverboj en junio

- Se junio malseka estas, la greno tiam ne fruktodonas.
- Se junio ploras, la sekalo ne sekiĝas, malmultaj leporoj kaj perdrikoj naskiĝas.
- Kion junio en la grenspikon ne metas, julio per la tempo atingas.
- Se en junio frostos, la rikolto ruinigita estos.
- Se la nordaj ventoj en junio blovas, la ŝtormoj malfruiĝas.
- Se junio malsekas kaj malvarmas, la rikoltoj ĉiam ruiniĝas.
- Se junio varme brilas, same ankaŭ septembro brilos.

AŬSTRIO AGNOSKAS ESPERANTON KIEL LINGVON DE KULTURO KAJ NEMATERIAN HEREDAĴON

La Aŭstra Komisiono de UNESKO formale agnoskis Esperanton kiel parton de la nemateria kultura heredaĵo de Aŭstrio. La oficiala anonco aperis la 16-an de aprilo 2026-a:

Kvar novaj kulturaj praktikoj estis oficiale aldonitaj al la Aŭstra Inventaro de Nemateria Kultura Heredaĵo. La konservado de ĉi tiu inventaro estas postulita de la Konvencio de UNESKO de 2003 por la Protektado de la Nemateria Kultura Heredaĵo. Ekde 2010-a, la Aŭstra Komisiono de UNESKO administras la inventaron. Kun ĉi tiuj novaj aldonoj, ĝi nun konsistas el entute 182 eroj.

La inventaro, strukturita laŭ la kvin areoj de nemateria kultura heredaĵo difinitaj de UNESKO, ampleksas amason da artaj esprimoj, parolaj tradicioj, tradiciaj metioj, sociaj praktikoj kaj festivaloj, same kiel scion pri la natura mondo. Ĝi registras la diversajn kulturajn esprimojn, kiuj estas vivantaj en Aŭstrio, ligas komunumojn kaj formas ĉiutagan vivon, malsamajn sezonojn kaj la tutan ciklon de la jaro. Kun ĉiu nova eniro, alia aspekto de ĉi tiu vivanta kultura heredaĵo estas rivelita kaj ĝia signifo elstarigita.

Vickanceliero kaj Ministro pri Kulturo Andreas Babler bonvenigas la plej novan pligrandigon de la inventaro: “Per ĉi tiu inventaro, ni plifortigas konscion pri nemateria kultura heredaĵo kaj elstarigas ĝian gravecon por la koncernaj komunumoj, same kiel ilian kreivon. Lingvo kaj komunikado, same kiel tradiciaj metioj, estas ŝlosilaj portantoj de ĉi tiu kultura heredaĵo ĉar ili transdonas scion, valorojn kaj esprimformojn laŭ vigla maniero, tiel certigante la identecon de komunumoj tra generacioj.”

Esperanta kulturo en Aŭstrio: Esperanto estas arta lingvo por provizi al homoj tutmonde neŭtralan kaj facile lerneblan lingvon por kompreniĝo kaj paco. En Aŭstrio, aktiva komunumo dediĉita al la konservado de ĉi tiu kulturo ekzistas jam pli ol 120 jarojn. Ili regule kunvenas por lingvokursoj, studsesioj, festivaloj kaj konferencoj. Krome, la komunumo disvolvis

rimarkindan verkaron en la kampoj de literaturo, muziko kaj prezentartoj.

Speciala momento por tiu agnosko okazos en la 111-a UK en Graz, Aŭstrio, de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2026-a.

Informo el la Gazetaraj Komunikoj de UEA

Pragaj pontoj



La arkitekturo de la Dvorecký-ponto forte similas kubismon. Eĉ la lampoj, inkluzive de la "ribelantino".

La urbo Prago havas plurajn pontojn. Ili estas silentaj atestantoj de ĝia riĉa historio.

La plej malnova el ili estas la Ponto de Karolo, kiu ligas du partojn de la historia centro. Laŭlonge de la tempo, pliaj pontoj estis konstruitaj.



La lasta el ili estis finkonstruita antaŭ nelonge - ĝi estas la Dvorecký - Ponto, destinita ekskluzive por la tramoj, busoj,

biciklantoj kaj piedirantoj. Personaŭtoj ne rajtas veturi sur ĝi. La fakuloj kredas, ke la ekfunkciigo de ĉi tiu ponto kontribuos al la malpezigo de la trafiko sur aliaj pontoj kaj al pliigo de la glateco de la trafiko, precipe sur la Barrandovský - Ponto. En la tago de la malfermo de trafiko sur ĉi tiu ponto, historiaj tramoj pasis sur

ĝi, kio kaŭzis interesan spektaklon. La ponto estis desegnita per



arkitektoj
en
kunlaboro
kun artisto
Kryštof
Kintera.
Ĝia
konstruo

havas rimarkeblajn elementojn de kubismo. Vespere kaj nokte,



lampoj lumigas la
ponton, kaj estas
interese, ke unu el ili,
nomata „ribelantino“,
havas iom malsaman
formon ol la aliaj. Ĝia
lumo falas sur la
akvosurfacon.

Skribis Běla Sýkorová

Kvarpiedaj entombigistoj de nuklea katastrofo

Post la akcidento en la nuklea centralo en Ĉernobilo printempe de la jaro 1986-a, la tieaj enloĝantoj devis rapide forlasi grandan areon kun grundo poluita de radiado, kiu eskapis dum la eksplodo. Tamen, posteuloj de hundoj, kiuj restis en la ekskludzono kaj sukcesis postvivi malgraŭ la apokalipsaj kondiĉoj, vivas tie ĝis nun.

La koncernaj hundoj estas posteuloj de kvarpiedaj dorlotbestoj kaj ankaŭ gard- kaj ĉashundoj, kiuj mirakle sukcesis postvivi la detruigan akcidenton antaŭ 40 jaroj, kiam en la nuklea centralo de Ĉernobilo eksplodis reaktoro numero 4. Sovetuniaj soldatoj de sia armeestraro ricevis ordonon senkompate forpafi ĉiujn hejmajn kaj sovaĝe vivantajn bestojn en tiu areo kaj forveturigadi ilin al kafilerioj, por malhelpi pluan disvastigon de la poluado.



La vasta plimulto ĉi tiun amasbuĉadon ne postvivis, sed tiuj, kiuj estis aparte ruzaj kaj rezistemaj al mortigaj dozoj de radiado, kaŝis

sin en la ĉirkaŭaj profundaj arbaroj, sukcesis postvivi kaj sekve eĉ reproduktiĝi. Plurcentoj el ĉi tiuj kvarpiedaj senhejmuloj vagas nuntempe tra la ekskludzono. Ili estas minacataj de radioaktiva kontaminado, atakoj de lupoj, kiuj ankaŭ vivas tie ĉi, oftaj incendioj, kontaminado kaj malsatado. Averaĝa longo de ilia vivo estas tre mallonga pro kombinaĵo de malfavoraj kondiĉoj - nur ĉirkaŭ tri ĝis kvin jaroj.

Sciencistoj, kiuj studas, kiel ŝanĝiĝas la kondiĉoj en la ĉirkaŭo de Ĉernobilo, rimarkis tre strangan aferon. Kvankam la hundoj, kiuj vivas en tiu areo, grandparte kondutas sovaĝe kaj lernis

serĉi sufiĉe da nutraĵo por pluvivi, ili pli kaj pli amikiĝas kun homoj.

Viro, kiu laboras kiel gardisto ĉe vojkontrolpunktoj, kontrolante nerajtigitaĵojn homojn, kiuj provas eniri la malpermesitan areon, surprize konstatis, ke li en sia nova posteno havas neatenditajn kunulojn. Laŭ lia konstato li ekŝatis la hundojn ekde la unua tago. Li komencis nutri ilin, karesi ilin kaj paroli kun ili. Aliaj hundoj estas retenemaj kaj proksimiĝas al homoj je la distanco ne malpli ol kvindek metrojn. La gardistoj nutras la hundojn regule, konstruas ŝirmejojn kaj hundobudojn por ili, kaj foje liberigas ilin de iksodoj, vakcinas ilin, aŭ, kunlabore kun libervolaj societoj de bestokuracistoj el Ukrainio kaj el eksterlando, ilin medicine prizorgas. Ili eĉ enterigas la mortintajn hundojn, kiuj amikiĝis kun ili.

Lucs Hixson, unu el la fondintoj de la usona neregistara organizaĵo *Clean Futures Fund (CFF, Fondaĵo por Pura Estonto)*, organizas adoptojn de bestoj en usonajn familiojn kaj ofertas virtualajn prispektadojn de la "neniesa zono" de Ĉernobilo, inkluzive de ĝiaj boĵantaj enloĝantoj. La organizaĵo forkaptas hundojn, prizorgas ilian kastradon kaj steriligon, baze ilin vakcinigas kaj mikroĉipigas. En la amaskomunikiloj estas popularaj kortuŝaj rakontoj pri bonŝanculoj, kiuj, danke al adopto, trovis sian vojon de ĉi tiu poluita medio al bonaj homoj tra la mondo.

Tamen, malpli estas konate pri la lokaj gardistoj, kiuj ĉiutage kontaktadas kun ĉi tiuj hundoj.

„Komence tiuj estis embarasitaj kaj suspektemaj, kial iu fremdulo volas ekscii pri ilia kunvivado kun vagantaj hundoj, sed iom post iom multaj el ili ekparolis. Ekzemple pri tio, kiel ili donas nomojn al la hundoj. Unu estas nomata Alfaradiado, iun melhundon, kiu ŝatas varmiĝadi sur longdistancaj hejttuboj, oni

nomas Kolbaseto, aŭ la hundartisto ricevis nomon Tarzan. La gardistoj ricevis fotilojn, por ke ili povu foti ĉiutagajn scenojn el la vivo de la hundoj kaj ilian kontakton kun homoj. La gardistoj konsentis subkondiĉe, ke ili estos provizataj per hundonutraĵo.

En siaj sciencaj artikoloj ĉi tiu organizaĵo provas refuti ĝeneraligitajn superstiĉojn pri radia poluado de hundoj kaj iliaj mutacioj. Mutacioj estis konstatitaj nur minimume. Rilate al radiado, la gardistoj ĉien kunportas dozimetroy kaj la hundojn kontrolas per ili. Ĝis nun, ili ne trovis ion ajn danĝeran."

El Květy elektis kaj mallongigis E. Pazourková, tradukis Fejfi.

Pentris Běla Sýkorová.

La bufo, kiu timis akvon

Farmisto trovis bufon kaj portis ĝin hejmen, por ke liaj infanoj ludu kun ĝi. Post kiam ili torturis la beston, unu el ili diris: "Ni mortigu ĝin! Ni ĵetu ĝin en la fajron!" La bufo respondis: "Mi sentas min hejme en la fajro!" Tiam la alia infano diris: „Ni ĵetu

ĝin en la dornaron!" La bufo diris denove: „Dornoj ne trapikas mian haŭton!" La plej aĝa el infanoj diris: "Ni ĵetu ĝin en la riveron!" La bufo ploris kaj diris: "Ne faru tion, mi dronos en la rivero kaj mortos!" La infanoj iris al la rivero kaj ĵetis la bufon en la akvon. La bufo ploris, sed poste tuj revenis al la surfaco kaj



ekkriis kun rideto: "Mi estas akva besto!"

El la interreto

Ŝercoj

Sinjinorino Svenson memorigas sian edzon, ke ili vizitos amikojn vespere kaj ke li devas ŝanĝi siajn ŝtrumpetojn antaŭ ol foriri.

Dum la vizito, sinjinorino Svenson profunde enspiras kaj akre demandas sian edzon:

"Harald, ĉu vi certas, ke vi vere ŝanĝis viajn ŝtrumpetojn?"

"Jes, jes, mi ja ŝanĝis ilin, sed mi sciis, ke vi ne kredos al mi, do mi havas la uzitajn en mia poŝo."

"Hieraŭ mia edzino forlasis min kun mia plej bona amiko, Petro."

"Ekde kiam Petro estas via plej bona amiko?"

"Ekde hieraŭ."

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**

Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice

Redaktoroj: Mirka Kosnarová, Ludmila Srbová

Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. +420 721 537 970

e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu

Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010

Bankovní spojení: Fio banka, číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**

IBAN: CZ3520100000002801322017 **SWIFT/BIC:** FIOBCZPPXXX

La jarabono de Informilo **22 €** (en kovertoj), aŭ **11 €** (e-mail)

Roční předplatné Informila **400,-Kč** (v obálkách), nebo **200,-Kč** (v e-mailu)

Při platbách vždy uveďte **vaše příjmení** jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.

Kotizo por AEH pravpravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z

La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.